

Oomoto

1
9
7
2

Mar.-Apr.

SURVOJE AL LA DIA REGNO

HIDEMARU

Kio estis iam farita evolue en fora pasinteco, ĉio nepre ripetigas. Kiel terura estas tiu leĝo de la universo! Oni diras, ke nia embrio, kiam ĝi estas en la patrina utero, ripetas (per formaj signoj) la proceson de la korpa evoluado farita en la longa daŭro de malproksima estinteco*).

Tamen, eĉ de post la naskiĝo de homo plue okazas, ke li ripetas ĉion, nome, ĉiujn travivaĵojn de sia antaŭa ekzistado. Lia nuna vivo diferencas de la antaŭa, plejparte, nur per la grado (ĉu alta aŭ malalta) kaj tempo (ĉu longa aŭ mallonga) de la ripetado de l' estintaj travivaĵoj.

Ekzemple, kiu mortigis homon en la antaŭa ekzistado, tiu nepre tion ripetas en la nuneco per forma signo. Tiaj "formaj signoj" ĉe individuo estas iel nekonscia imito de kio estis antaŭe farita. Li do faras ilin en la nuna vivo, dum li ignoras ilin kiel sensignifajn pasaĵojn, kaj en la plej multaj okazoj — preteratentas. Sed, se ilin ni tre atente observadas, eblas, ke ni rekonu, kia li estis en sia antaŭa ekzistado.

Plantoj ripetas la disvolviĝadon en la preskaŭ sama maniero, kiel en sia antaŭa ekzistado ili kreskis, floris kaj portis fruktojn. Al tio

*) Per tio la Aŭtoro probable aludas la evoluisman teorion pri ontogenezo kaj filogenezo.
— Noto de l' Trad.

Oomoto

47-a jaro

n-ro mar.-apr.
(381-382), 1972

*monata organo de Oomoto kaj Uni-
versala Homama Asocio (eldono:
dumonata)*

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio (por alsendo de
abonkoto, manuskriptoj, infor-
moj, k.s.):

OOMOTO, Kameoka,
Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561.

Posta ĝirkonto: Kioto 25637 (Oomo-
to).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono (1971): 24 steloj (1.70
usona dol.; 6.00 ned. gld.)

Reprezentantoj de Oomoto, ĉe
kiuj estas pagebla la abonkoto,
troviĝas en 24 landoj.

Pagebla ankaŭ rekte al la adminis-
tracio de Oomoto, aŭ al Univer-
sala Esperanto-Asocio, Nieuwe
Binnenweg 176, Rotterdam -2,
Nederlando.

Cirkulas en ĉ. 80 landoj.

AVIZO

Japandevenaj vortoj, kiujn ni de
temp' al tempo uzas sen glosoj en ĉi
tiu revuo, estas troveblaj en EJ
(= *Enciklopedieto Japana*).

iom similas ankaŭ la plenumado
de ĉiuj homaj faroj kaj agoj.
Sekve, se homo povus koni sin
mem en la nuneco, li povos prok-
simume rekoni, kia li estis en la
antaŭa ekzistado, kaj iugrade,
kia li estos ankaŭ en estonta.

Sed tamen, laŭ la grado, kiel
la Spirito (homo) evoluas kaj
progresas, malkreskas ĉe li, ĝis
preskaŭ senspure, la ripetotaj
formoj de lia pasinteco tial, ke
aldoniĝas dume novaj elementoj
de lia propra memo. Tio similas
al tio, ke la formojn de la pasin-
teco tra milionoj da jaroj li ripe-
tas nur per kelke da monatoj
dum en la patrina utero.


Ĉiuj vivaj estaĵoj havas la
tendencon sekvi la "antaŭan
formon". La birdoj de la ĉielo
kaj la bestoj de la tero nepre
sekvas la vojon, kiun ili antaŭe
trapasis.

Ankaŭ la homo, vivante por
evoluo spirita kaj korpa, sek-
vas la antaŭan formon de siaj
prapatroj (aŭ gardantaj spiritoj).
Same, ankaŭ la plantoj, insektoj,
fiŝoj. . . En tiu senco, ĉio en la
mondo estas iel ripetaĵo, kaj vere,

la historio sin ripetas!

Tamen, tio ne signifas, ke ĉio ripetiĝas ekzakte laŭ la antaŭa formo. Por diri simple, la ripetado aŭ sekvado de la antaŭaj formoj okazas laŭ evolulinio spirala, kaj tiu spiralo povas ĉu grade pligrandiĝi ĉu grade malpligrandiĝi. Tio signifas, ke la transformado okazas en maniero ne abrupta, sed iompostioma. Kaj se la spiralo ĉiam pligrandiĝadas, ni nomas tion “progreso”; se ĝi malkreskas, — “malprogreso”.

Ĉar la transformado okazas kun la neevitebla ripetado aŭ sekvado de antaŭaj formoj, ĝi estas ŝajne tre malrapida; sed depende de niaj strebadoj kaj cirkonstancoj, ni povas plenumi en la daŭro de mallonga tempo (t.e. astronomia) tre multajn ŝanĝojn kaj atingi belegan transformadon. Aŭ, male, ni povas resti en tia sama stato, kiel la antaŭa, dum longa tempo.



Krokizo de Hidemaru

La “tempo” de la kvar sezonoj neniel permesas la homon interveni por ia trudŝanĝo. Sed la “tempo” de homo estas je lia dispono. De la gradoj de lia strebado dependas, ĉu li bezonos longan tempon aŭ mallongan, por ke li trapasu, kaj sin levu, el la stato de spirita suĉinfaneco.

Por ŝanĝo de materiaj aferoj estas bezonata tiom da tempo, kiom da ŝanĝo de la ordo. Sed por ŝanĝo de spiritaĵaj aferoj ne ekzistas tia rekta proporcio inter ia statŝanĝo kaj la tempo bezonata por tio. Per siaj klopodoj oni povas eĉ en la daŭro de unu

momento plenumi tre multajn ŝanĝojn aŭ progresojn, aŭ — foruzi senliman multegon da tempo por fari nur unu ŝanĝon aŭ nur unu progreson.

La longviveco de homo konsistas tute ne en tio, ke li vivis jam tre multajn jarojn per sia korpo, sed ja en tio, ke en la daŭro de sia vivo, kiel ajn mallonga laŭ la jaroj, sukcesis per sia spirito supreniri multajn altajn ŝtupojn de la progresado kaj malfermis al si tre longan kaj vastan horizonton spiritan. Nur per tia metodo de longviveco oni povas fariĝi “granda homo”.

Ja estas introspektado, per kiu oni vojon serĉas; luminiĝo, per kiu oni ĝin trovas, kaj pentofaro, per kiu oni ĝin sekvas.

Kiuj sekvas vojon laŭ ordono de l' instinktoj, estas bestoj.


Kiuj sekvas vojon penon post peno, sinregon post sinrego, tagon post tago, malfermante antaŭ si ĉiutage novajn horizontojn, estas homoj.

Penso estas energio, ĝermo aŭ ento. La pensoj ripetataj pri unu sama afero faras ties bildon ĉiam pli klara kaj preciza. Tio estas vera kiel pri bono, tiel ankaŭ pri malbono. El la pensado pri certa malbelaĵo estiĝas malbelaĵo; el la pensado pri certa belaĵo estiĝas belaĵo. Kion oni pensadas, tion oni ricevas. Jen la unika principo de la spirita mondo (rilate al la materia).

Sfero, inter kies limoj kapablas pensadi formiko aŭ hundo (figura parolo!), estas la propra mondo de tiu formiko aŭ hundo. Sfero, inter kies limoj homo kapablas pensadi, estas la propra mondo de tiu homo, — mondo, kiu estas libere kulturebla por li.

Ju pli altiĝas kaj vastiĝas tiu lia mondo, des pli granda li fariĝas. La progreso de homo do konsistas en tio, ke lia “mondo” fariĝas ĉiam plialta, plivasta, plipura, plibela, ktp. Ni eterne strebados por

*Skribo
de
Hidemaru
■
(baro)*



tio kaj neniam estos laca de tiu celkonscia strebado.

Ĉi tiu homa mondo, kiu jam estas tiel malpurigita, ne povas esti elpurigita per unu tago aŭ nokto. Sed ni ne devas malesperi, ĉar la totala perfektigo estas la volo (celado) de la universo.

La videblaj dioj estas — homoj.

De kie venus feliĉo al la homa mondo, se la homoj mem ne klopodus por tio?

Troviĝas unusola afero, per kiu ni povas plibonigi la rilatojn en la homa mondo. Ĝi estas nia “favorkoreco” reciproka.

Jes, ni ĉiam agu kun sincera favorkoreco al ĉiuj!

Falsa malbonfaro el bonvolo multe superas falsan bonfaron el malico.

Mi tamen kun timo antaŭ Dio ĉiam demandas nur, ĉu mi faras Lian volon aŭ ne.

La homa korpo estas la vazo de Spirito; alivorte, la periferio aŭ materiigo de Spirito. La korpo kaj la spirito interrespondas. La interno koniĝas per ekvido al la ekstero. Se la interno pleniĝas de alta Spirito, tiam la ekstero vigliĝas; se malpleniĝas, — sin relasas.

Scioj akumulitaj de homoj pere de la ekstero utilas por nenio spirita. Veraj scioj estas sole tiuj, *komprenitaj* pri io ajn laŭ la internofluo*) venanta de altaj Spiritoj. La nuntempaj homoj ne rimarkante tro malhelpas sin per tiaj scioj akiritaj pere de la ekstero, por ricevi la internofluojn el la Spirita Mondo. Sekve, ili estas kiel sensentaj malsaĝuloj pri ĉio spirita.

Oni povas diri, iusence, ke la Spirita Mondo estas vertikala mondo kun senlimaj dimensioj, kaj la materia mondo estas loko, kie la Spirita Mondo necese estas sternita horizontale (kun kelkaj dimensioj), por ke oni vivu sian vivon pere de la materia korpo — por reciproka trejnado kaj hardado. En tiu senco, la homa mondo estas la ekzercejo aŭ reforgejo de la spiritoj. Kaj ĝi estas loko, kie plenas je striktaj limigoj por la spiritoj, kaj sekve, plenas je spiritaĵaj suferoj

*) Oomotisma termino: Inspirado de Dio kaj de superaj Spiritoj — Noto de l' Trad.

kaj angoroj. Neeviteble, ke la spiritoj suferas la katenojn de la fizika mondo!

Sed la homoj estas kreitaj kiel estuloj duonspiritaj-duonmateriaj; ili havas la naturajn kapablojn, interne, komunikiĝadi kun la Spirita Mondo, kaj, ekstere, disponadi la materian mondon kiel anstataŭantoj de Dio.

La homa mondo tamen pli kaj pli degeneris en materiismon kaj, ignorante la ekzistadon de la Spirita Mondo, perdis la ĝustan vojon por sekvi, kaj minacas sin puŝi en abismon de agonioj. Se homoj nur ekkonscius sian veran taskon naturdotitan kaj komprenus la rilaton inter la Spirita Mondo kaj la homa mondo, tiam ili — ĉar duonspiritaj — povos facile elturniĝi kaj vivi sian ĉiutagan vivon kun spirita ĝojo kaj ĝuo — sen superflujaj suferoj kaj angoroj. Tion ĉiu ja povas; al tio strebi li devas.

Se la nuna mondo abundas je spiritaj suferoj kaj angoroj, la kaŭzo evidente kuŝas en tio, ke la homoj forferis sian ĉefan funkcion spiritan al materiismo. Ĉi tio estas klara eĉ el nia individua sperto. Ĉiu ja scias, kiel multe lia koro devas suferi, se la cirkonstancoj devigas lin okupiĝi je la ĉiutaga laboro malgraŭvola, kvazaŭ nur por la vivtena nutrado de sia korpo.

Nur, se homoj povus sin returni al la maniero de sia primara vivo, ĉio agordiĝos per si! Se ili nur povus ricevi la internofluojn el la Spirita Mondo — aŭ senĉesajn ekfulmojn en la plejprofundo de sia koro kaj, laŭ tiuj, sekvos la vojon, ili povos vivi sian vivon, nur veran al ili, kaj sekve, ĉiam plenan de vivaj plezuroj kaj interesoj, negrave, kiel ajn ilia ekstero ŝajnus al aliuloj. Jen la sekreto de la homa vivo.

La ekzistado de la Spirita Mondo ne estas pruvebla per fizikaj teorioj. Kial? Ĉar la leĝoj de tiu mondo tute diferencas de la fizikaj leĝoj. Se la fenomenoj de la Spirita Mondo reale disvolviĝas tuj

antaŭ niaj okuloj, ni tamen neniel povas vidi ilin per karnaj okuloj. Tio estas tiel sama, kiel nia koro estas nevidebla por niaj okuloj.

La fiziologoj estas kompetentuloj, kiuj scias pri la fizikaj konsistoj kaj funkcioj de ĉio en la homa korpo. Ili tamen ne povas per anatomia sekcado eltiri kaj montri al ni la homan (senteman) koron. La materiistoj do konkludas, ke la koro malaperas samtempe kun la mortiĝo de la korpo. Certe jes, el la korpo, sed ne el la universo! La posedanto de tiu koro, ĉiam ankoraŭ kiel individua spirito, eniras en la spiritan mondon.

Neniu povas negi la fakton, ke ĉiu homo havas koron. Mi koresentas, ĉar mi havas koron. Sed per fizikaj teorioj oni ne povas diskuti aŭ pruvi la ekzistadon de nia koro. Neniel, ĉar la homa koro apartenas al la spirita mondo kaj la homa korpo — al la materia mondo.

La homo nenion povas kompreni, nek interne nek ekstere, pri la Spirita Mondo, se interne li ne ricevas la lumradiojn de tiu mondo, ĉar, ĉiuokaze, li disponas ne pli da saĝo kaj kompreno, ol kiom respondas tio al la spirita lumo, kiun li ricevas. Kiel ajn li saĝumus aŭ cerbumus per streĉado de siaj imagoj, li neniel povas superi sian saĝon kaj komprenon. Absolute maleblas, ke li pripensu aŭ perceptu ion ajn de la spirita mondo, sen ricevi la lumon de tiu mondo.

Ĉio en la universo, senescepte, plenumas sian aktivan rolon por la celo manifesti sian individuecon, kaj tiu ĝia aktiveco estas en si mem rekompencata.

Se ankaŭ homoj plenumas sian aktivan rolon por la bono de la socio, ilia aktiveco en si mem estas la primara celo, kaj la rekompenco, ekzemple, mona, — la sekundara. Sed al ilia aktiveco, vere celanta la bonon de la socio, nepre baldaŭ venos responda rekompenco. Se en la nuna socio ŝajnas, ke tio ne ĉiam tiel okazas, la kaŭzo kuŝas parte en tio, ke la socia sistemo estas malbona, kaj

Kiel ni, japanoj, kontribuu por la tutmonda Esperanto-movado*

Kiel enkondukon mi prezentas bazajn proponojn por nia movado.

Unue, ni plifortigu la movadon enlande kaj starigadu bonajn ekzemplojn imitindajn. Tio per si mem estos grava kontribuo por la mondomovado.

Due, ni havu pli viglan, pli vastan internacian agadon mondoskale kaj precipe inter la landoj Orientaj kaj Pacifikaj.

Antaŭ ĉio ni analizu, kio estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj, kiujn havas la japana Esperantomovado. Ni devas eluzi la avantaĝojn kaj venki la malavantaĝojn.

Japanujo estas lando, kiu reviviĝis post teruraj spertoj de la milito kiel lando de pacifismo, liberalismo kaj demokratio. Kvankam en realo

ne estas kontentige observataj la menciitaj principoj, estas tamen fakto ke ili estas la fundamento de nia nova konstitucio, al kiu ĉiuokaze sin submetas la popolo. En tiu senco Japanujo prezentas, oni povas diri, la plej favoran terenon por prospero de Esperanto. Se la popolo dume nur galopis por la industria prospero, ĝis fine realiĝis t. n. granda regno de ekonomio, tiom pli forte nun leviĝas la introspekto rekonduki ĝin sur la ĝustan vojon. Ĉi tiu nova tendenco certe estas favora por ni. Ni devas ĝin utiligi.

La ekonomia prospero, kiun atingis nia popolo, ankaŭ estas enkalkulebla inter la avantaĝoj, ĉar ia ajn movado bezonas monon. Antaŭ 13

* Resumo de la parolado farita ĉe la "Studkunveno de Gvidantoj", de EPA (vd p. 44)

parte en tio, ke la koncernaj individuoj tenas sin erare: ili ignoras Dion kaj ne agadas altruisme.

Kio tipe reprezentas la materian mondon, estas la oro. Kio tipe reprezentas la spiritan mondon, estas la koro. Oro estas nur subajo al koro; koro — surfacaĵo al oro.

“La rekonstruado de la mondo” konsistas en tio: sendi Mamon kun oro kaj monbiletoj al la gilotino! Renversi la mondon de Mono, por restarigi la mondon de Homo supre! (trad. T. N.)

jaroj, en la 44-a U. K. en Varsovio, centjara jubileo de Zamenhof-naskiĝo, mi estis la sola japano inter 4,000 partoprenantoj. Tiutempe la japana registaro forte bremsis la eldonon de pasportoj, ĉar ĝi devis gardi la mizeran konservon de dolaroj. Dek jaroj pasis, kaj en Helsinko, okaze de la 54-a U. K., kiun mi denove povis partopreni, troviĝis pli ol 60 japanoj. Poste en ĉiu U. K. oni vidas nepre kelkdekojn da japanoj. Tion ni dankas al la ekonomia prospero. Ni povos kaj devas ankoraŭ pli multigi la aliĝantojn al la U. K. kaj fari pli bonan organizon kaj antaŭedukon al ili.

Alia avantaĝo estas ke ni havas inter ni relative multajn sciencistojn kaj studentojn. Tiu fakto mem donas prestiĝon al la movado. Se ni klopodos, ke Esperanto estu praktike uzata pli efike en la scienca kampo, tio rekte tiros atenton kaj respekton ne nur de la sciencista rondo, sed ankaŭ de diversaj gravaj sferoj de la socio.

Ke ni havas organizitan movadon jam de pli ol 60 jaroj, kiu estas sufiĉe forta laŭnombre kaj kvalite, tio estas elstara fakto inter la Orientaj landoj. Tiun ĉi avantaĝon ni devas dediĉi por kunlabori kun la najbaroj.

Estas rimarkinda fakto, ke en nia lando la mondfederacia movado vaste disvolviĝis ne nur inter la ĝenerala popolo, sed ankaŭ inter la membroj de la Parlamento kaj la konsilantoj de la urboj kaj gubernioj. Jam pli ol 250 urboj kaj guber-

nioj oficiale deklaris la aprobon pri la ideo kaj pretecon ke ili apartenos al la mondfederacio, kiam ĝi fondiĝos. La celo de la mondfederacio estas, simple dirite, unu komuna mondoregistro super ĉiuj naciaj registaroj. Tio estas tre simila al nia devizo: unu komuna internacia lingvo super ĉiuj nacilingvoj. Ni devas pozitive kunlabori kun tiu fratmovado kaj elpensi efikajn rimedojn por enpenetri en ĝiajn membrojn kaj simpatiantojn.

Ni atentu ankaŭ la fakton, ke lastatempe preskaŭ miliono da japanoj ĉiujare vojaĝas eksterlanden plejparte por turismo. Ili tre malbone aŭ simple tute ne kapablas paroli fremdan lingvon. Ili nur sekvas la gvidistojn, kiuj siavice ofte malbone posedas eĉ unu fremdlingvon, se jam ne paroli pri pluraj lingvoj, kiuj estas parolataj respektive en la vizitataj landoj. Ili, la vojaĝantoj, mute kaj surde, nur supraĵe rigardas la t. n. vidindaĵojn sed spertas preskaŭ nenian kontakton rekte kun la tie vivantaj homoj. Jen la kaŭzo de la hontinda famo, ke japanaj turistoj senĝene post-lasas aĉajn piedsignojn. Aĉa vojaĝanto ne zorgas honton pli ol konton! Vojaĝu senhonte, ĉion renkonte? Oh, neniel!

Agado al la politika kampo ankaŭ ne estas preterlasebla. Ĝis nun ĝi estis ĝenerale tre malforta. Ni ripetite ekzemple kampanjon kolekti subskribojn por peticio prezentota al la Eduka aŭtoritato kaj la parlamento rilate la enkondukon de Esperanto

en la lernejojn. Ni ne pensas, ke tia peticio tuj kaj facile plenumiĝos, sed ni grave taksu la efikon de la ripetado mem, kiu iom post iom plivas-tigos la komprenon kaj atentemon pri nia afero.

Ni jam informiĝis ke la Japana Socialista Partio havas sian edukan planon, en kiu Esperanto estu instruata en elementaj lernejoj. Ni fondu komitaton, kiu ĉiam kontaktiĝos kun la menciita partio, interŝanĝante taŭgajn informojn. Tiu komitato agu ankaŭ al la aliaj partioj krom la Socialista.

Ni starigu taŭgan Esperantiston kiel kandidaton okaze de la Ĝenerala Elekto. Se ni sukcesos sendi lin al la Parlamento, li povos labori tre efike por la movado. Tion dirante mi rememoras d-ron A. Tanakadate, kiu en ĉiu sesio de l' tiama senato nepre faris demandon al la eduka ministro aŭ ĉefministro pri enkonduko de la latina alfabeto laŭ la t. n. japana sistemo. Jam antaŭ pli ol dudek jaroj la eduka ministerio faris tute favoran decidon laŭ lia aserto.

Se ni transiras al la malavantaĝoj, unue okulfrapas la fakto, ke la angla aŭ usona lingvo inundas la tutan landon precipe post la milito. Ĝi estas por japanoj la sinonimo de la internacia lingvo aŭ fremda lingvo, kvankam ili povoscias nur iom legi, iomete skribi kaj tute ne paroli. Mi tamen lastatempe rimarkis la tendencon de ioma retiriĝo el la blinda imitado de la usonaj aferoj. Tion utiligante, ni povos kompre-

nigi ke la laŭmoda lernado de usona lingvo ja estas kontribuo al la lingva imperialismo, se ne konscia. Estas bonvena novaĵo, ke la Eduka Ministerio instrukiis malplimultigon de la horoj de l' anglalingva instruado en la mezlernejoj. Jen iomete malfermita pordo, tra kiu ni enmarŝu internen en la Edukan Fortikajon.

Unu el niaj malfortaĵoj estas ke ni havas tre malmulte da altnivelaj verkistoj kaj tradukistoj; alia estas la nebona parolarto ĝenerale kaj ankoraŭ alia estas la neakurateco en korespondado. Ni devas forte strebi por venki ilin.

Laŭ la oficiala informilo de U.E.A. ni vidas nur plimultiĝon je 167 de individuaj membroj en la jaro 1971 kompare kun 1970, kaj eĉ malmultiĝon je 1,490 de asociaj membroj. Ni sentu nian respondecon ankaŭ en tiu fakto.

Nun mi prezentu kelkajn detalajn programojn de nia internacia agado por via pozitiva diskuto hodiaŭ kaj morgaŭ.

- 1) plimultigo de membroj de U.E.A.
- 2) plimultigo de monkontribuoj al U.E.A.
- 3) plimultigo de aliĝantoj al la U.K.oj
- 4) interŝanĝo de delegacioj inter ni kaj esperantistoj ĉinaj, koreaj, vjetnamaj ktp.
- 5) okazigo de Pacifika Kongreso de Esperantistoj.

Ĉe la fino mi volas atentigi, ke la tutlanda organizo de Oomoto estas

Kio necesas por pli efika laborado?

— aktivaj japanaj esp-istoj pridiskutis —

Esperanto-Propaganda Asocio (specialigita suborganizo de Oomoto-movado) kunvokis aktivajn esperantistojn el diversaj partoj de Japanujo por havi “studkunvenon de gvidantoj” kun la celo prilumi diversajn fazojn de la japana Esp-movado. Responde al tio, kunvenis ĉe Oomoto-domo en Kameoka, 35 aktivuloj el 12 gubernioj dum 2 tagoj, 19 — 20 marto, 1972, kaj arde diskutis pri tri ĉefaj temoj de “edukado”, “informado” kaj “organizado”.

En la unua tago, 19-an, la kunvenantoj unue aŭskultis tri prelegojn kiel enkondukon de la posta diskutado: s-ro Eizo Ito, prezidanto de EPA, analizis ĝeneralajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la japana Esp-movado en sia parolado “Kiel ni, japanoj, kontribuu por la tutmonda Esp-movado” (kies resumon oni povas legi en tiu ĉi numero sur p. 41). Prof. José de Campos Bretas, de Kiota Kolegio de Fremdaj Lingvoj, prezentis kun abundaj ekzemploj la “teknikajn aspektojn de Esp-instruado”. Pri “Kelkaj no-

vaj aspektoj de Universalaj Kongresoj en lastaj jaroj kun aparta konsidero pri la 57-a U. K. en Portlando” parolis s-ro Joŝimi Umeda, sekretario de EPA, surbaze de sia partoprenado kaj observado de kongresaj laboroj en la lastaj kelkaj jaroj, prezentante novajn programerojn kaj ŝanĝojn en la Kongresoj kaj aktivajn informlaborojn de la Kongresa Gazetara Servo. Li aparte substrekis la gravecon de la du Universalaj Kongresoj en Londono kaj Portlando, kiuj havas saman karakterizon rilate al la defio de esperantistoj kontraŭ anglalingva superregado en la nuntempa monda lingva problemo.

Poste, la kunvenantoj, konsistantaj el veteranoj, lokaj kernuloj kaj novaj grupmotoroj, interŝanĝis spertojn de sialokaj agadoj, en la unua ĝenerala kunsido, tiel ke pli reliefigis gravaj mankoj de trafaj agadprincipoj en ĉiuj tri temoj.

Vespere, ili rigardis belan filmon “Oslo, la ĉefurbo de vikingoj” kun klara esp-lingva komentario. Tiu ĉi

utiligebla por nia Esperanto-movado, kvankam ne ĉiuj oomotanoj estas mem esperantistoj. Ili ja estas

tre simpatiaj kaj ĉiam pretaj fari ĉion kion ili povas.

filmo estas venigita el Norvegujo kaj rondiris jam dek lokajn esp-grupojn tra Japanujo. La kunvenantoj plie ĝuis liberan konversacion dum la komuna vespermanĝo kun frandaĵoj kaj trinkaĵoj ĝis noktomezo. Ili vere profitis tiun ĉi okazon por amika interparolado kun la neofte renkontataj geamikoj.

En la dua tago, la kunvenantoj dividiĝis en tri fakajn kunsidojn por pliprofunde studi la problemojn respektive pri edukado, informado kaj organizado. Ili tre entuziasme pritraktis multajn aktualajn demandojn, kiuj aperas en la gvidado de lokaj agadoj. La rezultoj de trihora diskutado estis poste transportitaj en la duan ĝeneralan kunsidon, posttagmeze, en kiu ĉiuj kune pripensis la komunajn problemojn kaj prezentis pli konstruajn ideojn kaj opiniojn por superpaŝi malfacilajn cirkonstancojn.

Kiel la konkludon de tiu ĉi studkunveno ĉiuj ĉeestantoj aprobis resumi la rezultojn de la du-taga entuziasma diskutado en formo de rezolucio, por tiel apeli al ĉiuj aktivaj esperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj pri aktualaj problemoj solvendaj por pli efika laborado en la tutmonda Esp-movado. Jen sekvas la rezolucio, kiun subskribis ĉiuj kunvenantoj.

REZOLUCIO

Ni, 35 geesperantistoj el diversaj partoj de Japanujo, kiuj kunvenis

en Kameoka ĉe Esperanto-Propaganda Asocio, 19-20 marto 1972, eltiris niajn komunajn konkludojn rezulte de la ĝenerala kunsido, en la unua tago, tri fakaj kunsidoj respektive pri Edukado, pri Informado, kaj pri Organizado, kaj la 2-a ĝenerala kunsido kun la diskutoj pri la konkludoj de la fakaj kunsidoj, en la dua tago, rezolucias ;

1. Pri edukado

a) Estas urĝe necese ellabori kunlabore instruplanon almenaŭ por la elementa kurso, inkluzive de adekvataj instru-metodoj kaj eventuale provotaj programoj.

b) Samtempe estas tre necese konstante eduki kvalifikitajn kursgvidantojn paralele al la punkto a).

2. Pri informado

Estas tre rekomendinde starigi informoservojn, kiuj sisteme ricevas kaj distribuas Esperantajn novaĵojn, ĉar tre multaj aktivaj Esperantistoj en Japanujo konstatas la ĝeneralan mankon de la informa aktiveco inter ni kaj Esperantistoj eksterlandaj, kaj ekstere en niaj publikaj rilatoj.

Samtempe ni forte deziras pli intensigi kaj aktualigi niajn kontaktojn internaciajn precipe kun aktivaj Esperantistoj en Azio.

3. Pri organizado

Ni konstatas la aktualan mankon de interrilatado de lokaj aktivuloj, kaj forte rekomendas pli bonan reciprokan informadon pri esencaj problemoj de nia organizado.

la 20-an de marto, 1972

ANIM-KALENDARO

Enkonduko de la Tradukinto

Estas por mi, kaj espereble ankaŭ por vi, granda ĝojo, ke mi povas prezenti al vi la tradukon de l' "Antropozofia Animkalendaro", kiu estas siatempe donita al ni de D-ro Rudolf Steiner en la germana lingvo.

Verŝajne vi, en la fora oriento, neniam sciigis pri Rudolf Steiner. Pro tio kelkajn vortojn pri ĉi tiu granda homo, kiu vivis en la okcidenta Eŭropo (1861 — 1925), kiel plej genia spirit-esploristo. Li inaŭguris novan spirit-sciencan por la homo de ĉi tiu tempo: la 'Antropozofion'. Li iam diris: "Antropozofio estas sci-vojo, kiu volus konduki la spiritan en la hom-estajo al la spirita en la Kosmo". Kun la de li el la ĉieloj ekkaptita spirit-saĝo li fekundigis preskaŭ ĉiujn branĉojn de la materialista scio. En lia vivo- kaj mondo-percepto unuiĝas renovigita scio, arto kaj religio.

En Oomoto (maj-jun '71), kiun mi ricevis donace de s-ro R. Slot, la loka delegito de U. E. A., Zeist, mi trovis (p. 69) la vortojn:

"Dio estas spirito, animanta ĉion de la universo kaj la homo estas la administranto de la ĉielo kaj la tero". "La homo estas la respondeculo por la prospero de la universo". "La homo estas la filo de Dio kaj administranto de la universo".

Tiaj vortoj povus esti diritaj ankaŭ de Rudolf Steiner. En la sentencoj de l' 'Animkalendaro' vi trovos vortojn kiel:

'La Homo-Mi sin perdi povas
Kaj trovi sin en Mondo-Mi' (11)

'Mi sentas, ke al mi la pov' donita
La Memon propran en la Mondo-Memon
Modeste kiel anon envivigi' (35)

'De la animo la kre-povo,
Ĝi nun celadas el la korogrundo
En homovivo la Di-fortojn
Flamigi je agado ĝusta,
Sin mem fasoni

En homo-amo kaj en homo-verko'

Ŝajnas al mi, ke tiaj vortoj povas tuŝi la animon kaj krom tio la spiriton, ne nur de ĉiuj Oomotanoj, sed ankaŭ de tiuj homoj en la tuta mondo, kiuj penadas al la vera re-ligo inter sia memo kaj la Mondo-Memo.

H. Joh. Theissen (Nederlando)

ANTAŬPAROLO

La jarkuro havas sian propran vivon. La homanimo povas konsenti ĉi tiun vivon. Kiam ĝi lasas efiki je si tion, kio ĉiun semajnon alie parolas el la vivo de l' jaro, nur tiam ĝi sin vere trovas per tia kunvivo. Ĝi sentos kiel per tio kreskas al ĝi fortoj, kiuj fortigas ĝin el la interno. Ĝi spertos, ke tiaj fortoj volas esti vekitaj en ĝi per la partopreno, kiun ĝi povas havi en la senco de l' mondkuro, kiel tiu ĉi okazas en la temposinsekvo. Nur per tio ĝi rimarkos, kiuj delikataj, sed interesplenaj ligiloj ekzistas inter ĝi kaj la mondo, en kiun ĝi ennaskiĝis.

En ĉi tiu kalendaro estas desegnita por ĉiu semajno tia sentenco, kia lasas kunvivi la animon pri tio, plenumiĝas en ĉi tiu semajno kiel parto de la tuta jarvivo. Tio, kion ĉi tiu vivo sonigas en la animo, kiam ĉi tio kuniĝas kun ĝi, volas esti esprimata en la sentenco. Estas pensata al sana 'unu-sentado' kun la irado de la naturo kaj al el tio estiĝanta forta 'sin-mem-trovado', opiniante ke konsentado de la mondkuro en la senco de tiaj sentencoj estas por la animo io, al kio ĝi sentas sopiron, se ĝi nur vere sin mem komprenas.

Rudolf Steiner

Printempo (Paska-Etoso)

A Unua Semajno (7a — 13a Aprilo)

- 1 Kiam el mondovastoj
La sun' parolas al la homosenso,
Kaj ĝojo el animprofundoj
Kun lumo en alvido unuiĝas,
Tiam direktas sin el ingo de l' memaĵo
La pensoj al la spacoforoj
Kaj ligas, nur neklare,

La Homestajon al Estado de l' Spirito.

B **Dua Semajno** (14a — 20a Aprilo)

2 En la eksteron de la sensomondo
La pensopovo perdas sian proprestadon ;
La mondoj de l' Spirito nun retrovas
La homoposteulon,
Kiu en ili ĝermon sian,
Sed sian animfrukton
En si mem trovi devas.

C **Tria Semajno** (21a — 27a Aprilo)

3 Parolas al la kosmo,
Sin mem nun forgesante
Kaj memorante ĵus devenon sian,
De l' homo la kreskanta Mi :
En ci, liberigante min
El la katenoj de l' miaĵoj miaj,
Mi fondas mian ver-estajon.

D **Kvara Semajno** (28a Aprilo — 4a Majo)

4 Mi sentas ja estajon de estaĵo mia :
Tiel parolas la percepto,
Kiu en mondo, tralumata de la suno,
Kun la lumfluoj unuiĝas ;
Ĝi volas nun al la pensado
Krom klaro doni varmon
Kaj homon kaj la mondon
En unueco fikse ligi.

E **Kvina Semajno** (5a — 11a Majo)

5 En lumo kiu el spiritprofundoj
En spac' teksante fruktodone
De l' Dioj kreon videbligas :
En ĝi aperas la estaĵo de l' animo
Je l' mondestado vastigita
Kaj ree leviĝinta

La Atlantika Oceano

Estis mia dua tago en Portugalujo. Mi trovis Lisbonon dormeme staranta sur la sep montetoj, en blanka aspekto, sin bananta en la varma, posttagmeza sunbrilo. Ravas ĉiun vizitanton ĝiaj apartaj naturaj ĉarmoj, agrabla klimato kaj fantazia pasinteco... vizito, kiu devus okazi almenaŭ unu fojon

en ĉies vivodaŭro. Mia amiko-gvidanto s-ro Gonzalez veturigis min en sia aŭto tra larĝaj, trafikplenaj stratoj, konstante babilante al mi en sia flua Esperanto. Abundas malnovaj kasteloj kaj katedraloj. Pompas reĝaj palacoj. Dise videblas mirindaj postsignoj de riĉega historio. Mi admire aŭskultis al la

*) La Aŭtoro estas nia kara amiko, nun loĝanta ĉe sia filo en Londono kaj vojaĝanta al diversaj lokoj en kaj ekster Anglujo. Espereble ni povas atendi daŭrigon de ĉi bela verko per aliaj vojaĝimpresoj. — La Red.

El ena povo de l' memaj' malvasta.

F **Sesa Semajno** (12a — 18a Majo)

6 Releviĝinta estas el miaĵo
Jam mia Mem' kaj trovas sin
Kiel revelacio de la mondoj
En fortoj de la temp' kaj spaco ;
La mond', ĝi ĉie al mi montras
Kiel pra-bildo Dia
De la de-bildo propra nun la veron.

G **Sepa Semajno** (19a — 25a Majo)

7 Minacas mia Mem' forkuri,
De l' mondolum' potence altirata.
Nun ci, pravigu cin, ho alsentado mia
Per ciai rajtoj forte,
Anstataŭigu ci al mi la povon de l' pensado,
Kiu en ŝajno de la sensoj
Sin mem ja perdi volas.

(*Daŭrigota*)

klarigado pri ĉiuj mirindaĵoj fare de mia portugala amiko. Post du-hora enurba rondveturado ni eniris eksterurbon kaj sekvis la aŭtovojon flankitan de oliv-arboj kaj aliaj subtropikaj verdaĵoj. Estis vera plezuro rapide veturi, jen laŭlonge de pitoreska marbordo, jen tra arbaroj de suda beleco, sub la bluo de ĉielo.

Baldaŭ poste ni haltis, por kafa-paŭzo, en Sintra, romaneca kaj ĉarma vilaĝo, kie iam loĝis angla poeto Byron. Ĉirkaŭe staris luksaj somerdomoj de milionuloj de la mondo. Ni daŭrigis la aŭtadon kaj postnelonge ni troviĝis en eta apudmara urbo Estoril (kia belsona nomo!), silenta kaj kvieta, kie, oni diras, la klimato estas "eterna printempo". Diris s-ro Gonzalez: "Estoril estas urbo eleganta, aminda, revema kaj melankolia".

"Mi kunsentas kun vi, sinjoro" mi respondis, "sed diru, kial melankolia?"

"Tion vi tre baldaŭ komprenos" li diris kun enigma rideto, sin turnante al mi. Mi staris stulta, nekompreneble pri kio temas. Tiu-momente li rapidigis sian aŭton en okcidentan direkton. Post dudek minutoj, mi trovis min staranta sur alta krutaĵo, alfronte al la Atlantika Oceano. Mia amiko diris:

"Rigardu! Jen tie ĉi finiĝas la Eŭropa Kontinento! Tie ĉi estas la plej okcidenta punkto! Aŭskultu la tondradon de la oceano!"

Mi rigardis antaŭen, senspire kaj senmove. Tie ja kuŝas la gran-

dioza akvovasto de la maro. La ŝaŭmantaj ondoj dancas, furiozas, muĝegas kaj sin ĵetegas kontraŭ la klifon, sur kies supro mi staras. Miaj kruroj tremetas de timo kaj apenaŭ ebligas min daŭre stari. Fajfis vento pli kaj pli minace. Ondoj post ondoj disrompiĝis. Estis terura spektaklo. Momente ekkaptis min forta sento de soleco, izoleco kaj nostalgio. Mia penso forflugis al la malproksima hejmlando pro kora ŝira sopiro. S-ro Gonzalez rapide ĵetis sian rigardon al mia ĉagrenita mieno.

"Cu vi ne sentas vin malĝoja?" li demandis.

"Jes, mia amiko" mi respondis per voĉo, en kiu vibris nuanco da melankolio. "Mi bone komprenas nun. Ni ekiru returnen al Lisbono, ĉu ne?" mi diris malĝoje. Kortuŝita kaj pensema, mi viŝis per naztuko la larmojn de sur la vangoj. Li silente turnis sin al mi; niaj okuloj renkontiĝis. Li vidis la ŝiran doloron ĉe mi. Ni sentis la saman sentvibron. Ni kvazaŭ eniris unu en la animon de la alia. En la sekvanta momento, li subite turnis la aŭton kaj veturigis ĝin je plena rapideco en la direkto al Lisbono.

Kiam ni atingis la hotelon, la ruĝa vespera suno estis subironta sub la horizonton. Mi kore dankis al s-ro Gonzalez por la komplezo, kiun li faris al mi, gvidante min en kaj ĉirkaŭ Lisbono dum du tagoj. Ĉe la manĝotablo ni komentis pri la impresoj de la tago kaj nia interparolado daŭris ĝis malfrua nokto.

La Esperanto-movado en Vjetnamujo

(2)

Kiel de ĉiuj sciite, la pasintaj 15 jaroj vidis ĉe ni bonan antaŭenpaŝon en la Esp-eldonado. Ĝis nun, 57 Esp-libroj je ĉiuj specoj — skizoj, eseoj, rakontaroj, novelaroj, romanoj, poemoj, dokumentoj. . . tuŝintaj ĉiujn flankojn de la vjetnama vivo — historio, kulturo, folkloro, literaturo, moroj, sociaj aktivecoj. naciŝava batalo — tiaj eldonaĵoj gajnis la simpatiajn kaj eĉ la varman apogon, tre larĝan, de la verda legantaro el ĉirkaŭ okdek landoj. Ili efektive kontribuis diskonigi la veron pri nia lando, nia vjetnama popolo kaj pri ties revolucia heroismo en la socialisma konstruado same kiel en la naciŝava batalo kontraŭ la usonaj agreŝantoj. El la varmaj publikoj de diverslandoj, ni devas citi unuavice la japanan esp-istaron, kiu diversforme subtenis kaj subtenas nian eldonlaboron. Ĝis nun, kvar el niaj Esp-libroj estas tradukitaj kaj eldonitaj en la japana, por ne citi sennombrajn artikolojn de ili tradukitajn kaj publikigitajn sur diversaj japanlingvaj gazetoj kaj revuoj. En diversaj kluboj tra la belega kaj pacama insularo, japa-

naj gesamideanoj kun intereso legadis kaj popularigis niajn eldonaĵojn; ili morale kaj materiale subtenis kaj subtenas nin per librovendoj aŭ monokolektadoj favore al la vjetnama kaŭzo kontraŭ la usona agreŝo. Pro tiuj viaj eminentaj, sindonemaj aktivecoj ni ŝuldas al vi la plej profundan dankemon. Estas menciinde kaj dankinde al ĉiuj niaj diverslandaj gesamideanoj, dank' al ties laboroj pluraj el niaj prozaĵoj kaj poeziaĵoj estas tradukitaj rusen, germanen, hungaren, bulgaren, polen, anglen, sveden, hispanen, portugalen, finnlingven ktp. . .

Nia Asocio ĝis nun starigis amikecajn kaj kulturajn rilatojn kun Esp-organizaĵoj kaj esp-istoj de pli ol 60 landoj. Kun Mondpaca Esperantista Movado, kies sekcio ĝi estas, VPEA kunlaboras per la aperigo de preskaŭ ĉiujara vjetnama numero de PACO kaj laŭ siaj eblecoj partoprenas ties aktivecojn. La sekretariaro de MEM, same kiel pluraj ĝiaj landaj sekcioj, el kiuj la japana, plurfoje manifestis, per deklaroj kaj agoj, sian plenan subtenon al la justa batalo de

nia vjetnama popolo kontraŭ la agreso fare de la usonaj imperiistoj. Ĉie, esp-istoj tra la mondo protestis kontraŭ ĉiu militeskalado de Usono, kaj plu energie kondamnas la krimojn de genocido, biocido kaj amasmurdado kulpe de la usonaj agresantoj en Vjetnamujo kaj Hindoĉinujo. Unu el la plej progresema kaj vigla esp-istaro de nia mondo, Japana Pacdefenda Esperantista Asocio kaj la tuta japana samideanaro energie protestas kontraŭ la politiko "vjetnamigi la militon" de Nixon, kiu nur celas daŭrigi kaj vastigi la militon; japanaj amikoj plene subtenas la 4-punktan pozicion de la registaro de Vjetnama Demokratia Respubliko, la 10-punktan programon de la Nacifronto de Liberigo de Suda Vjetnamujo kaj ties pacinicia-tivojn, krom kiuj la nunan pacinicia-tivon el 7 punktoj de la Provizora Revolucia Registaro de Sudvjetnama Respubliko, kiel bazojn logikajn, pravajn por solvi la vjetnaman problemon. Inter aliaj la japana samideanaro nepre postulas la tujan, kompletan, senkondiĉan retiron de la UStropoj for de Suda Vjetnamujo kaj for de la tuta Hindoĉinujo, la nuligon de la pupa administracio de Thieu en Sajgono, por ke vera kaj daŭra paco revenu al Sud-Orienta Azio. Niaj japanaj gesamideanoj ankoraŭ luktas por malpermesi al la usonaj imperiistoj kaj ties lakeoj uzi la teritorion

kaj riĉaĵojn de Japanujo kiel bazon kaj provizumejon por la usona agresmilito en Vjetnamujo kaj Hindoĉinujo. Tiel klara, firma kaj senlaca subteno de via flanko estas por ni, vjetnamaj esp-istoj, granda kuraĝigo en nia afero.

Ni havis kaj havas tre bonajn rilatojn kun la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj same kiel kun Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĉiuj aliaj Esp-organizaĵoj en la frataj socialismaj landoj, dum ili ĉirkaŭigas nin per siaj elkoraj subteno kaj helpo.

Ja kun ĉiuj aliaj pacamaj Esp-organizaĵoj tra la mondo ni starigis kaj starigas ankaŭ bonajn rilatojn, almenaŭ per interŝanĝado de libroj kaj periodaĵoj. Sed estas tutspeciale menciinde, ke la vasta esp-istaro tra la kvin kontinentoj montris kaj montras al ni sian grandan simpatian. Ora Libro sen lasta paĝo devus esti malfermata por enregistri ĉiujn tiujn geamikojn el diversaj landoj, kiuj tia-kaj-aliamaniere subtenis la justan kaŭzon de nia vjetnama popolo kaj la aktivecojn de VPEA. Efektiviĝis multmilaj ekspozicietoj kaj prelegoj pri Vjetnamujo, sennombraj monkollektadoj favore al Vjetnamujo, senfinaj alsendoj de donacoj, medikamentoj, vestaĵoj kaj salutleteroj, ĉio tio entuziasmigis kaj profunde kortuŝis la vjetnamajn esp-istojn same kiel ĉiun

vjetnaman batalanton. Ankaŭ tiom multe emocia estas tiu fakto, ke kvazaŭ seninterrompe venas al ni, el la pioniroj-esperantistoj de la frataj kaj aliaj landoj, tia alfluo de kajeroj kaj lerniloj por la vjetnamaj infanoj! Mi devas aparte citi i. a. kelkajn gestojn, tiom noblajn, de fremdlandaj gesamideanoj: la hispana samideano Felician Oliven per petskribo memvole rekrutiĝis kiel internacia batalanto de nacia fronto de Liberigo de Suda Vjetnamujo, kaj tiun titolon, simbole kaj oficiale, rekonis por li la gvidantaro de tiu institucio. El la pacama esp-istaro de Usono, ni citu la noblan geston de s-ino Helga Herz, kiu sinbruligis proteste al la militpolitiko de la usonaj regantoj. Sama gesto, kiu manifestiĝis ĉe la japana samideano Ĉunoŝin Jui proteste al la komplika politiko de Sato-registaro en la usona agreso kontraŭ Vjetnamujo, forte skuis ĉiujn niajn korojn. Kvan-kam ni rekomendas al ĉiuj niaj geamikoj nur pozitivajn subtenagojn, paralele kun la persistema kaj venkoplena batalo de nia popolo kontraŭ la usona agreso.

En 1959, nia Asocio sukcesis sendi delegacion al la 2a Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado kaj samtempe al la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Varsovio.

Nia delegacio, konsistinta el s-ano

Nguyen Van Kinh kiel estro kaj s-ano Dao Anh Kha kiel membro, tiuokaze havis la feliĉon partopreni en la 100-jara Jubileo de la kreinto de Esperanto kaj ĉe la tombo de D-ro Ludoviko Zamenhof meti omaĝan florbukedon je la nomo de ĉiuj vjetnamaj gesperantistoj. Tiu grava kontaktiĝo kun la mondo esp-ista malfermis por VPEA disflorantan epokon de amikecaj interrilatoj kun eksterlando. De tiam, pluraj el niaj gemembroj havis okazajn renkontiĝoj kun fremdaj esp-istoj en diversaj landoj, kiel Le Tuyet Thanh, Bui Hanh Can, Truong Quang De ktp. . . kaj tiaj personaj renkontiĝoj pli malpli utilis al nia komuna afero. Sed la unua rolo tiurilate ankoraŭ apartenas al nia prezidanto, li mem grava diplomato de nia lando. En 1965, japanaj geamikoj projektis inviti mesaĝiston de nia vjetnama esp-istaro al sia gastama lando; bedaŭrinde, tio ne povis efektiviĝi. Sed anstataŭe, ni nun havas la grandan feliĉon akcepti s-anon Hideo Kumaki sur nia batalanta tero.

Kun Japana Pacdefenda Esp-ista Asocio, same kiel kun Japana Esp-Instituto kaj diversaj Esp-rondoj de via lando, jam de longe ni havis bonajn rilatojn kaj tiu amikeco nur kreskas. Foje kaj foje niaj japanaj gesamideanoj pruvis sian elkoran subtenon al VPEA kaj al la tuta

vjetnama popolo per noblaj, sindone-
maj aktivecoj, kortuŝaj agoj morale
kaj materiale helpi nin. Ĝis nun vi
multe helpis al nia eldonlaboro per
presmaŝino kaj presmaterialoj, krom
pluraliaj laboriloj por VPEA. Kaj
fine kaj plej elokvente, la hodiaŭa
vizito de samideano Hideo Kumaki,
la multe atendata kaj paca heroldo
de la japana esp-istaro, al nia gas-
tama lando kaj popolo, kvazaŭ kro-
nas tutan periodon de bonaj rilatoj
inter ambaŭlandaj esp-istaroj kaj
certe, ni tion esperas kaj plene kre-
das, ĝi malfermos novan etapon en la
historio de niaj amikecaj interrilatoj.
Certe sekvos multaliaj bonaj kontak-
tiĝoj inter ni, kiel fruktoj de lia
vizito al nia vjetnama esp-istaro je la
nomo de ĉiuj niaj japanaj gesamide-
anoj.

Fine, responde al la postulo de
nia kara gasto, mi iom raportos pri
la organizado kaj internaj aktivecoj
de nia Asocio. Dum la 15 pasintaj
jaroj, nia Asocio sukcesis esperantistigi
pli ol dumil kvincent personojn, kiuj
per ekzameno ricevis sian Ateston pri
unuagrada lernado de Esperanto.
Ĉirkaŭ sepcent el ili ricevis la Ateston
pri Duagrada Kapableco. Ili ĉiuj estas
ĉu aktivaj ĉu subtenantaj membroj
de VPEA. El la plej viglaj aktivuloj
de tiu ĉi periodo mi citu Nguyen
Cong Mon, Nguyen Hai Trung, Ngu-
yen Minh Kinh, Nguyen Minh Tung,

Phan Tam, Do Ngoc Thuan, Nguyen
Ninh, Pham Dinh Dien, k.a. . . Ho-
diaŭ ni estas formantaj, per regulaj
kaj neregulaj Esp-kursoj, tute novan
generacion de esp-istoj, el kiuj certaj
fariĝis viglaj kunlaborantoj de nia
Asocio por la tradukado kaj eldonado
de libroj kaj periodaĵoj. Ni disponas
pri unu Esp-Klubo en Hanojo, kie de
tempo al tempo okazas Esp-kurso, ĉu
unuagrada ĉu duagrada, ĉu vespera
ĉu dumtaga, kiu daŭras de tri ĝis
kvin monatoj. Tie ankaŭ ofte kolek-
tiĝas niaj esp-istoj, ĉu por pridiskuti
niajn taskojn, ĉu por ĉeesti prelegon,
ĉu por celebri datrevenon de iu
amika lando, ĉu por subteni la lukton
de amika esp-istaro. Kiel ekzemplon
mi citas la tute freŝdatan mitingon
de hanojaj esp-istoj por subteni la
lukton de la japana esp-istaro kaj
popolo kontraŭ la Japan-Usona
Sekureca Traktato, por la tuja kaj
senkondiĉa redono de Okinavo al
Japanujo, kaj vian senlacan, brave-
gan lukton por Japanujo sendependa,
libera, demokratia, neŭtrala kaj pros-
pera. Tie ankaŭ ni de tempo al
tempo organizas ekspozicion pli mal-
pli gravan pri Esp-o, kiun frekventas
multnombraj ne-esperantistoj. Niaj
klubanoj foje bonvenigis fremdland-
ajn gesamideanojn, ekzemple la ĉeĥan
samideanon William Hajduček en la
jaro 1957, la bulgaran samideanon
D-ro Todor Todorov en 1962, la

ĉinan verkiston Ba Kim en 1966, la geedzojn Thedenskog el Svedujo en 1963.

Estas rimarkinde, ke nia ŝtata Fremdlingva Eldonejo jam de pluraj jaroj havas sian Esp-fakon, kies ĉefa respondeulo estas s-ano Nguyen Minh Kinh, malnova kaj lerta esp-isto de nia lando. Tio pruvas, ke Esp-o estas konsiderita en Vjetnama Demokratia Respubliko kiel unu el la oficialaj fremdlingvoj, kiun nia Ŝtato utiligas. Tiu Esp-fako funkcias kunlabore kun niaj plej kapablaj esp-istoj, kaj helpe de VPEA, kiu mobilizas kaj unuigas la fortojn en kolektiva kaj serioza laborado. Ĉijare, por akceli la eldonlaboron, VPEA decidis starigi ankaŭ sian propran Eldonejon. Cetere, sub la gvido de la Centra Komitato de VPEA, aktiviĝas certaj komisionoj, kiel la Redakcio de INFORMADO, la revizia komisiono kiu prizorgas la lingvonivelon de la eldonaĵoj, la instruada komisiono kiu planas kaj efektiviĝas Esp-kursojn, la propaganda komisiono, ktp. . . Sed por sincere diri, tiuj Esp-rondoj ankoraŭ ne sufiĉe regule aktiviĝis.

Tamen mi devas konfesi, ke ne ĉio iras glate, sukcesplene en niaj laboroj. Restas pluraj malhelpoj objektivaj kaj subjektivaj, pluraj mankoj de nia flanko. Ni konsideras ilin nur provizoraj. Ekzemple en la tradukado de fremdlandaj E-verkoj en

la vjetnaman, ankoraŭ restas pluraj mankoj. Sed mi povas citi la maloftan kaj plenan sukceson de la laboro de s-ano Le Tuyet Thanh, unu el niaj komitatanoj, kiu tradukis vjetnamen el Esp-o, la japanan kontraŭ-atombomban libron *ĈE LA KADAVRO DE L' EDZINO*, verko de Sadami Tanaka. La tradukita libro estas varme aklamita de nia publiko kaj ĝi elvendiĝis rapide. Pri la korespondado kun eksterlandaj esp-istoj, ni renkontas ĉefan malhelpon, kio estas la usona agresmilito mem, kaj la multflanka okupiĝo de niaj homoj en la nuna batalo, pri kies ne-korespondemo bedaŭris pluraj fremdaj geamikoj. Plie, plejparto de niaj esp-istoj nur komencas sian lernadon, kaj pro sia nebona posedado de la lingvo, ili ne emas korespondi, kvankam ĉiu scias, ke la korespondado mem perfektigos al ĉiu lian lingvon. Restas ankoraŭ al ni la tempo atendi, ĝis la fino de tiu ĉi usona agresmilito, por sukcesplene akceli la korespondadon de niaj gemembroj. Nia Asocio klopodos en proksima estonteco efektiviĝi sisteman planon altigi la lingvonivelon de niaj komentantoj. (Kompreneble tio ne signifas, ke ekzistas neniu korespondemulo en mia lando! Ĉar antaŭ ĉio, vi jam trovis min mem, ĉu ne? kaj hodiaŭ, jen la renkontitajn gesamideanojn). Alia manko: Ni ankoraŭ ne sukcesis

FOR LA ĤAOSON!*

La ĥaoso nepre pligrandiĝos ĝis oni agnoskos kelkajn faktojn :

1-e, ke multaj lingvoj (inter kiuj la araba, la indonezia, la korea kaj la japana) havas pli internacian land-nomenklaturon ol la “uj-Esperanto” de l’ nuna UEA aŭ ol la “i-Esperanto” de SAT.

2-e, ke -uj, ne pli ol -i, povas esti “universala”, t. e. esti la finaĵo de ĉiuj landnomoj. Se Zamenhof origine skribis Islandujo, Holandujo kaj eĉ Amerikujo, oni de longe forlasis tiun universalan sistemon kaj diras ekz-e : Nederlando, Nepalo, Tibeto. . . ĉu temas pri sendependaj landoj aŭ pri provincoj.

3-e, ke la ĥaoso venas de l’ trudo de iuj (ili estu grupoj aŭ individuoj) aldoni senutilan -i (aŭ -uj) al formoj, kiuj internacie — kaj ofte ankaŭ origina-nacie — per si mem nomas la landon : Ekz-e : Meksikio, Nepalujo ktp, anstataŭ Meksiko, Nepalo. Nenio malhelpas la aliajn obei la 15-an regulon de l’ Fundamento. Tiel ke nuntempe, virtuale ĉiu organizo kaj ĉiu redakcio havas sian propran “nomenklaturon”, en kiu la dozo de radikaj formoj, de formoj kun -i kaj eventuale ankaŭ de formoj kun -uj estos iom alia de l’ aliaj “nomenklaturetoj”.

*) Simpla noto okaze de l’ artikolo de l’ Aŭstriano D-ro Adolf Halbedl. (La radiko “aŭstr-” signifas oriento kaj do ne povas nomi homon ; propre Aŭstr-io, kun sufikso -i, signifas “Orienta Lando” ; cetere Österreich en la germana signifas precize “Orienta Regno”.

— Noto de l’ Aŭtoro

organizi kaj firmigi larĝan retaron de Esp-filioj en diversaj lokoj de la lando, kvankam ekzistas preskaŭ ĉie novaj aŭ malnovaj esp-istoj. Spite tion, ili regule kontaktiĝas kun nia Asocio kaj vigle partoprenas en ĉiuj ĝiaj aktivecoj. Tamen ni estas konviktaj,

ke tiaj malfacilaĵoj estas nur provizoraj, ĉar supereblaj pli malpli rapide. Ĉar ni disponas je membraro unueca, unuiginta kaj ĉiu laŭ sia ebleco klopodas helpi la Asocion plenumi siajn sanktajn devojn rilate al la patrujo kaj al la homaro. (Fino)

4-e, ke la sufikso -i lingve venkis malgraŭ ĉiuj barpafadoj kaj ke la Akademias "kondamnoj" de Cart estas bazitaj sur mensogo, kiel montris Waringhien en "Lingvo kaj Vivo". Almenaŭ morale tiujn "Kondamnoj" oni povas do konsideri kiel nulaj kaj ne faritaj.

5-e, ke la sufikso -i tiel same ne povas esti "universale" uzata : ne pli ol lando (kiun oni uzas nur en kelkaj vortformoj, konforme al la internacieco — internacieco ne eŭropa, sed monda), ne pli ol -uj (kiu vidas sian rolon limigitan de -lando), aŭ ankaŭ por kompari kun la cetera lingvo, ne pli ol -isto, -aĵo, -ilo. Oni ja voste gluas neniun esperantan sufikson al iu ajn radiko kaj ekzemple ne diras : profesoristo, tablaĵo, martelilo. . . Nur por landoj oni arogas al si ion tian.

6-e, ke la sistemo, kiun Cart simplige nomis "Sistemo de Zamenhof" envere estis trudita de Beaufront jam en 1892, en epoko kiam Zamenhof uzis ankoraŭ sian propran "universalan" sistemon (Holandujo, Amerikujo. . .). Laŭ tiu bofronta sistemo, se lando apartenas al difinita etno, kiel Korea, Korea, Corée. . . aŭ kiel Viet-Nam, la radiko DEVAS nomi la etnon, eĉ spite al etimologio kaj internacieco.

7-e, ke jam ĉe l' komenco ekestis escepto al tiu perforta kaj senutile dogma sistemo : Netherlands, Pays-Bas, Nederland apartenas ja al nur unu etno, sed oni escepte allasis Nederlando, Nederlandanoj. La nombro de tiuj esceptoj graviĝis de jar' al jaro el same evidentaj motivoj ; sed jen. . . ne ĉiuj samagrade agnoskis la motivojn !

Eblas ŝerce sin demandi, kio okazos, kiam post milo da jaroj estiĝos sendependa raso sur la nokta astro ! Ĉu oni tiam devos raporti ekzemple en la ĵurnaloj "La lunoj ribelis kontraŭ la teroj kaj jam forflugis de Lunujo por ataki la strategiajn punktojn de Terujo". — Sed jam nun okazas similaj karambuloj ! !

*

La haoson ni povos — eble — forigi, nur se ni decidiĝos science studi la demandon lingve kaj historie. Mi aludas la historion de l' problemo en nia movado mem. Tian studon mi entreprenis jam de pluraj jaroj kaj esperas baldaŭ anonci ĝiajn rezultojn.

William Hudson King (1900 – 1972)



La Esperanto-movado ricevis kru-elan baton kaj multaj Esp-istoj suferis dolorigan perdon kiam nia bonkonata samideano William H. King mortis la 25-an de januaro. Dum kvindek du jaroj “Vilĉjo” estis aktiva Esp-isto. Mi unue renkontis lin en 1928, sed li estis jam sperta Esp-isto kiu multon faris por la lingvo. En 1920 li aniĝis al BEA kaj dum la sekvanta jaro restarigis la Whangarei E-klubon, helpite de s-ro Tilly, kaj estis elektita sekretario-kasisto. Dum la sama jaro li ricevis la diplomon de la Brita Esp-ista Asocio. En 1925 li ĉeestis la 5-an Aŭstralazian Kongreson kaj kvankam li estis nur 25-jaraĝa oni elektis lin prezidanto de la kongreso. En Nov-Zelando li konatiĝis al la

publiko per la prezentado de serio da paroladoj en la radio pri Esp-o el 2YK en Wellington.

Por mi estis grava okazo kiam ni interkonatiĝis en 1928. Ambaŭ estis entuziasmaj kaj ni havis la saman opinion, ke estas necese havi denove nacian asocion por progresigi la lingvon. Vilĉjo jam kompilis nacian adresaron kun tricent nomoj sur kiu ni povus bazigi nian agadon. Ŝajnis, ke Wellington estas la plej taŭga loko por inaŭgura kunveno. S-ro Potts, nia nuntempa honora prezidanto, estis la vigla kaj entuziasma sekretario de la loka klubo kaj s-ro Jack estis prezidanto. Tiuj du, kaj vic-prezidanto s-ro Dust, forte subtenis nin. Vilĉjo skribis centojn da leteroj, la kunveno okazis kaj decidis favore al nia propono. Sed ĉi tio estis nur la komenco. Necesis multe da laboro por efektiviĝi veran nacian asocion kaj tiucele Vilĉjo, kiel honora sekretario laboregis dum dek jaroj. Al li, pli ol iu alia, ni ŝuldas nian firme bazitan Asocion. Kiam li petis iom da ripozo post tia laboro oni elektis lin al nova ofico kie la laboro estis malpli peza sed kie la Asocio povus ankoraŭ profiti lian grandan sperton kaj saĝan konsilon. En tiu ofico

Blua Drako

(printempo-fabelo)

Longaj volvaĵoj de Blua Drako etendiĝis super la Tero. El ĉiuj aspektoj ĉielaj li estis tiu, kiu la plej ĝin amis. Lia filino, Printempo, donis al teranoj la ĝojon, kaj oni ŝin konas

(vic-prezidanto) li kontribuis dek unu pluajn jarojn da laboro kaj denove en 1954 komencis novan periodon en la sama ofico.

Por plene raporti pri la Esp-a laboro de s-ro King necesus verki libron preskaŭ tiel grandan kiel lia propra Historio de la Esp-Movado en Nov-Zelando, ĉar efektive la historio de la viro estas ankaŭ la histrio de la movado en Nov-Zelando. Li laboris en ĉiu sfero. Por la U. E. A. li estis vic-delegito, delegito, fak-delegito kaj kelkfoje reprezentis la novzelandan komitatanon, s-ron Allan, ĉe komitat-kunsidoj. Li estis peranto por Oomoto, reprezentis Nov-Zelandon ĉe Universalaj Kongresoj, starigis aŭ flegis lokajn klubojn, publike prelegis, verkis leterojn pri Esp-o por la tag-jurnaloj: la listo estas preskaŭ senfina. Kiam en 1963 NZEA elektis

kaj ŝatas, alnomante ŝin "Ĉarma", "Sorĉa" k. t. p. En altaj superteraj sferoj estis decidite rompi finfine la teran ŝelon: ĉiuj ĉielanoj opiniis ke tiu malmola, kruda ŝelo estas la

lin Fratulo, estis nenia dubo ke li plene meritis la honoron.

Mi ĝojas, ke li mem provizis taŭgan memorigaĵon pri si. La ampleksa historio kiun li verkis pri Esp-o en Nov-Zelando dum la unuaj sesdek jaroj estas tre grava kontribuo al nia movado kaj estas karakteriza ekzemplo de lia penema laboro. Mi esperas, ke la Asocio faros fortan penon, tiel ke tiu ĉi verko povu aperi en presita formo kiel eble plej baldaŭ. Eble la amikoj de nia ŝatata samideano dezirus kontribui iom por plifaciligigi tiun taskon? Vilĉjo estis bonkora viro kiu ne kverelis kaj havis multajn amikojn. Mi kredas, ke mi parolas por ĉiuj Esp-istoj en Nov-Zelando kiam mi diras, ke lia amita edzino, Margaret, ne funebras sole, kaj ke ŝi havas nian tutkoran kondolencon.

C. J. Adcock

kaŭzo de la same malmolaj homaj koroj. Por tiu celo Blua Drako elektis unu el la avataroj de Printempo — belan knabinon, kiu sub nomo Aŭroro, kune kun Printempo descendadis sur la teron kaj poste ankaŭ kune malaperadis. La tasko estis giganta, tamen por ĝin plenumi nur delikata Aŭroro estis taŭga. Tiel decidis ĉielanoj. Kontraŭ bruteco — la plej subtila energio. Ĝi venkos!

La frumatene leĝeraj piedoj de Aŭroro tuŝis la teron. Salutis ŝin gaje la floroj, kaj el sub baldakenoj da florantaj arboj juna Dukorna Luno faris riverencon. Komenciĝis frenezaj pro ĝojo tagoj kaj noktoj. Ĉio estis rava, ĉarma, sorĉa; eĉ la plej eta herbeto ekbriladis feliĉe sub aspergo de roso. Lampiroj lumigis la festenojn en malhelaj arbaroj, vibrantaj laŭtakte de mallaŭtaj tonoj, kiuj rondiras en ilia interno. Ne mirinde ke sub la influo de tiu ĝenerala etoso, Aŭroro forgesis pri sia misio. Kaj iunokte... en sonĝo venis ŝia fratino kun nigra vizaĝo kaj floranta branĉeto de ĉerizarbo en la mano.

— Kial vi forgesis pri via tasko? — ŝi demandis mirigitan Aŭroron. — Nia ĉiela patro atendas... Aŭdu kion mi faris dum via dancado... Dank' al mia malhela vizaĝo mi povas ĉie alproksimiĝi nepercepteble. Aŭdu atente, ĉar tio estas granda mistero

— ŝi flustris en la orelon de Aŭroro. — Vagante, mi malkovris la fendon, tre longan, kiu kuras laŭlonge de la tera ŝelo, kaj en iu punkto io batas... Mi kliniĝis kaj tuŝis la nudan, vivan koron de la Tero! Bedaŭrinde, ĝi estis preskaŭ same malmola kiel la ŝelo... Vekiĝu kaj iru! La loko estas facile trovebla: mi metis sur ĝin branĉeton de la ĉerizarbo...

Post vekigo Aŭroro ekvidis tra fenestro sian amikon Lunon, kiu estis en plena majesto. Favore kaj galante li invitis ŝin al boata promenveturo sur unu el liaj lagoj. Kaj tage la varmega suno faris tiom da proponoj de gaja amuzo, ke neeble estis pensi pri noktaj interparoloj. La tempo fuĝis nepercepteble.

Iunokte... ŝia fratino havis duonhelan vizaĝon kaj ion tenis en la mano.

— Vi ne fidas al miaj flustroj, do mi alportis ateston de mia vero — ŝi diris kun riproĉo. — Ĉiuj viaj floroj ne surŝutiĝos sur la tremantan, malsanan koron de la Tero. Mi komencis fosi, kaj elfosis multe da salo tera, kiun oni nomas: sufero...

— kaj ŝi malfermis sian manplaton.

— Kion vi faras?! — elkriis Aŭroro — vi disŝutis sur mian litaĵon grizan, malpuran polvon! Ne mia kulpo ke belo ne mildigas ĉagrenon kaj suferon... Iru nun! Mi atentos pri via polvo.

Varmaj tagoj fariĝis nun varmegaj, kaj Aŭroro sentis jam pezon de la sunradioj. Ŝi ankaŭ ŝanĝiĝis: ŝi estis pli serioza. Kun miro ŝi ekperceptis ke homoj ŝajnas esti iel lacaj, kvazaŭ la longdaŭra ĝojo kaj bela aŭro estus por ili troa ŝarĝo. Videble estis ke ili atendas ian ŝanĝon, ke ili esperas pri io nova. Vespere Aŭroro sopiris... al kio? Ŝi mem ne estis konscia. Tamen konfesojn de sia fratino ŝi tute ne prenis serioze.

Tiunokte... Ŝia fratino en sonĝo havis vizaĝon helegan, lumigitan per lumeto, kiun ŝi tenis sur sia manplato.

— Malbona fratino, — ŝi diris severe — ĉu mi ne instruis vin ĉiunokte, ke amuziĝante vi ne devas enamigi en viaj objektoj de amuzo, sed devas trakti ilin per ia distanco? Nun la situacio estas stranga: ĉio sopiras al ŝanĝo, ĉio celas al ŝanĝo, nur vi staras en firma punkto! Vi eĉ ne antaŭvidas ŝanĝojn.

— Tiel faris vi per viaj senĉesaj noktaj subflustroj... Ĉiam, ĉiam, pri neplenumita tasko, pri neplenumitaj devoj! Mi ne povis rompi la ŝelon, mi ne povis moligi al homoj la korojn, nek mildigi iliajn suferojn. Kion mi povus fari?

— Nur foriri. Kaj ĝuste jam estas tempo.

— Vi ankaŭ kun mi, kiel mia ĝemela fratino.

— Mi restos, dank' al mia interna fajro; vi subiĝos al senfinaj ŝanĝoj... Ĉio sur tiu planedo estas dividita per linioj de lumo kaj malumo. Akre desegniĝas la limoj... Tial ni devas disiĝi... ĝis kiam?... tio dependas nur de vi... Adiaŭ! — la voĉo de la fratino sonis jam de forajo.

Aŭroro sidis sur la herbejo plena de orkoloraj floretoj.

“Kiam iliaj petaloj velkos, kaj ŝanĝiĝos je rondformaj polvaj kapetoj, mi pasos kune kun ili”, ŝi pensis. Nenio terura estis en tiu penso. Subite en memoro venis al ŝi la bildo de grandioza sinjoro ĉiela, Blua Drako. Ĉu ŝi povus stari rekte antaŭ lia vizaĝo? Neniam! Li konas ĉiujn ŝiajn pensojn. La timo estis tiel terura, ke Aŭroro komencis fuĝi, ne sciante kien. Fine, ŝi, tre laca, kaŝiĝis en arbaro, inter filikoj, sub granda arbo.

Iu alpaŝis... Tiu estis en blanka robo, radianta, kaj kliniĝis super la kuŝanta knabino.

— Tio vi estas, Aŭroro, kiu velkas kune kun la Printempo? —

— Kiu ajn vi estas, savu min! — eldiris Aŭroro per malforta voĉo. — Blua Drako ne pardonos min pro la ne-plenumita misio. Mi descendis teron por rompi teran ŝelon kaj

Historia fakto

En "Oomoto" (N-ro jul.-aŭg., '71) skribas s-ano Adolf Halbedl el Aŭstrujo tre strangan artikolon sub la titolo "Refuto al malĝustajo", en kiu troviĝas la granda eraro: "Aŭstrujo neniam alinaciigis ceterajn naciojn". Kio estas la vero?

Fine de la 1500-aj jaroj la Habsburg-reganta domo fremdiĝis de la hungaroj. Hungaroj ne povis esti gvidantoj de la ŝtato aŭ de la armeo. La aŭstruja fisko, por pli grandigi la maloftan profiton, prokurore akuzis la hungarajn nobelojn kiel reĝ-ofendantojn kaj ekzekutigis ilin. Poste la sieĝo de Vieno (1683); la armeoj de imperiestro Leopordo I komencis la liberigon de Hungarujo el sub la turka okupado. La reric-

korajn homajn, kiuj havas en ĝi siajn radikojn. Neeble estis tion fari. . . mi mortas. . . malperfekta.—

Radianto staris enpense, kaj diris malrapide:

— Ne timu! Oni ne devas timi, estante eĉ meze en la rondo da ŝanĝoj. Imagu, ke vi troviĝas kune kun ĉiuj estaĵoj en la spiralo, kiu ĉirkaŭvolvas la Veron. La spiralo ĉiam supreniras, do vi vole aŭ nevole,

vitajn teritoriojn li donacis ĉefe al fremdaj sinjoroj.

"Devas malsovaĝigi la hungaran sangon", li akcentis, "por ne ribeli por ĉiam". La plej bonega por ili estis tio, ke li sendis fremdulojn dise en Hungarujon. La imperiestro konfiskis la hungaran konstitucion, malpermesis la religian praktikon kaj germanigis ĉie.

Kontraŭ la absolutismo de la imperiestro, Ference Dákóczi II direktis la fortan liberecbatalon (1703 — 1711). La eksterlando simpatiis kun la liberecbatalo de la hungaroj, sed donis nenian helpon. Grade kiel ĉesis la militoj okcidente, la imperiestro venkis la lacajn hungarajn armeojn.

plenumas la volon de la Kreinto. Estu trankvila, vi reviviĝos kune kun tiu floreto. . .

— Kiu vi estas? — demandis Aŭroro kun lasta spiro.

— Vi min ne konas? — la Radianto tuŝis ŝian ŝultron. — Tio estas mi, Blua Drako. . .

La kapo de Aŭroro kliniĝis al la korolo de l' floro, kaj ambaŭ velkis.

Dum la reĝado de Karlo III komenciĝis la rekonstruado, sed la reĝo tiel organizis ĝin, ke veraj hungaraj gvidantoj ne postenu ĉe respondecaj oficejoj en Hungarujo.

Karlo III kaj Maria Terezia (1740 — 1780) faris grandegajn koloniojn por la malbono de la hungaroj. Tamen sukcesis la granda plano de Maria Terezia; ŝi ne povis nuligi la hungaran servutecon. La malbonvolo de la regantino ne lasis fortigi la industrion en Hungarujo.

Filo de Maria Terezia, Jozefo II (1780 — 1790) denove provis perforti la germanigon en Hungarujo. Li reprezentis la interesojn nur de Habsburg-imperio kaj volis oferi ĉiujn tradiciojn kaj valorojn de la hungaroj. La lingvo de hungaraj oficejoj fariĝis germana kaj estis nuligita la hungara konstitucio.

Posteulo de Jozefo II, Leopoldo II nevolonte kliniĝis antaŭ la volo de Hungarujo kaj akceptis la ĉirkaŭbastionigon de hungara konstitucio.

En la hungara parlamento formiĝis komitatoj por fari reformojn. Poste la subpremo de francoj; la reĝo enkondukis la sekretan policon, la spionsistemon, la cenzuron ankaŭ en Hungarujon. La aŭstruja registaro ĉiam suspekteme observis la hungarajn renovigajn klopodojn kaj ĉiam aspiris malhelpi la reformojn.

La 15-an de marto 1848 la junuloj de Peŝt perbatalis la presliberecon kaj igis enmeti en 12 punktojn la dezirojn de la hungara nacio. Ĉi tiam formiĝis la unua respondeca hungara registaro. La hungaraj

ŝtatviroj proklamis egalrajtecon antaŭ la leĝo, forigis la servutecon kaj proklamis la partoprenon en la komuna elspezado.

Aŭstrujo nevolonte akceptis la hungarajn dezirojn kaj ggratis la okazon por retrudi al Hungarujo la staton de kolonia ŝtato. La Viena registaro agitadis diversajn naciojn armile kontraŭ Hungarujo. La hungaroj armile defendis sian liberecon, kaj printempe de 1849 forpelis la imperiestrajn taĉmentojn el Hungarujo. Habsburg-Aŭstrujo vokis por helpo la armeon de rusa caro, kiu venkis la hungaran armeon.

Aŭstrujo pendigis la generalojn de la hungara armeo (6.10.1849 Arad) kaj ekzekutigis la gvidantojn de la hungara politiko. Ni ne scias la nombron de tiuj, kiuj suferis en la diversaj karceroj.

La aŭstruja registaro ne nur konfiskis ĉiujn rajtojn kaj la konstitucion de la hungara nacio, sed ankaŭ nuligis la verkojn de la reform-epoko. Ministro Aleksander Bach delegis aŭstrajn oficistojn al la administracio de Hungarujo.

Inter Aŭstrujo kaj Hungarujo okazis kompromiso en 1867. La kompromiso ne alportis la ĝeneralan kontentiĝon. Ne ekzistis memstara hungara armeo, nek hungara doganteritorio. Malbona estis la situacio de la agraraj proletoj. Pli ol 1.000.000 homoj forlasis la landon kaj enmigris en Usonon.

En la jaro 1919 Hungarujo liberiĝis el sub la aŭstruja jugo.

Ĉanoja Salono

★ D-ro Adolf Halbedl, Aŭstrujo: —
En dimanĉa eldono de la grava
jurnalo “Kleine Zeitung”, Graz,
Aŭstrujo, ties vica ĉefredaktoro d-ro
Kurt Wimmer skribas sub la titolo
“Malkara paco”:

“Kiu estas por la paco? Stulta
demando! Kompreneble ĉiu.

“La grandaj potencoj estas por
la paco kaj la malgrandaj estas
por la paco; la unuopulo estas por
la paco kaj kompreneble ankaŭ la
amasoj.

“Pri la paco estas multe paro-
late, sed por la paco estas mal-
multe farate.

“Ankaŭ la usona packorpuso
estas por la paco kaj ĝi faradis jam
multe por la paco.

“Sed nun ekmankas al la pac-
korpuso financaj rimedoj. Ke mili-
to kostas monon, oni scias. Pri ĉi
tio ĉiuj kutimiĝis. Multon da mono
kostas ekzemple la milito en Vjet-
namujo. .

“Sed ree pri la packorpuso. Al
ĝi oni koncedis per la USA-leĝo pri
la helpo al la eksterlando malpli-
igon de 5,6 milionoj da dolaroj
(proksimume 135 milionoj da aŭst-
raj ŝilingoj).

“5,6 milionojn da dolaroj tro
multaj por la paco!

“Paco pro angoro estas bona, ĉar
la armadindustrio bezonas mend-
ojn. Ĉi tio certigas profitojn kaj

nature laborpostenojn. Paco pro
konfido estas suspekta; ĉar, se oni
laboras por la paco, ja io alia ankaŭ
promesiĝu tial, ke aliokaze nia
ekonomia sistemo eble malsatmor-
tus. Kien ni ja atingus! Per mal-
egoisma helpado aŭ simile. . . .

“Kaj tial oni devos revoki volon-
tulojn de la packorpuso el landoj
evoluigendaj. Ĉar la paco estu
malkara, ĉar la milito kostas
monon. Ekz-e la milito kontraŭ
Vjetnamujo kostas proksimume 50
milionojn da dolaroj (ĉ. 720 milion-
ojn da aŭstraj ŝilingoj). Ja potage!”

★ S-ro Felix Epstein, Hamburg,
Germanujo: —

Mi ne volas preterlasi raporti al
vi tre strangan koincidon: la *saman-
tagon*, kiam mi ricevis la lastaperin-
tan numeron de via ŝatata organo,
enhavantan la interesan artikolon
de David K. Jordan pri “La Ĉina
Lingvo”, kun la grava bibliografio,
mi aŭdis en la radio kaj legis en la
gazetaro, ke la usona prezidanto
S-ro Nixon aranĝis bankedon por la
ĉinaj eminentuloj, kaj por tio la
invitkarto estis verkitaj kaj presi-
taj en *klasika, arkaika*, ĝenerale ne
plu uzata ĉina lingvo, — fakto, kiu
kaŭzis parte ridon (mokon) kaj
parte nekomprenon aŭ eĉ koleron!
Vere tre strange, ke la usonaj invit-
aranĝintoj eviden'e ne konis la nu-
nan situacion de la lingva uzado en
Ĉinujo, malgraŭ tio, ke en Usono
ekzistas bonaj informiloj pri tio.